

TEATRAĴO “ROMPU, ROMPU!” EN MATADERO

La 29an de novembro, je la 7a vespere, oni prezentos en la kulturcentro Matadero teatraĵon titolitan “Rompu, rompu (la murojn inter la popoloj)!” [tiel, en Esperanto].

Temas pri verko de la artisto Blanca Gracia, ŝia projekto por restado en la CRA (Centro de Art-restado) de tiu kulturcentro. Ĝi estas konceptita kiel hibrida projekto, utiliganta la teatran reprezentadon, la animacion kaj la sonon kun la celo pripensi la povon de la lingvo kaj la voĉo kiel socia ilo. Kiel rezulto aperos eksperimenta projekto, formita el aŭdvidaj kaj teatraj pecoj, kreanta trilogion de malgrandaj partoj.

En la projekto kunlaboris Madrida Esperanto-Liceo kaj Hispana Esperanto-Federacio: Miguel Fernández esperantigis la tekston de la tria akto, kie Esperanto plej rolas, kaj Alejandro Pareja instruis la aktorojn pri prononcado.

La eniro estas senpaga ĝis la kompletigo de la ejo, post bilet-prenado en la ĝiketo. Grupo de esperantistoj certe ĉeestos kaj kolektiĝos iom antaŭe ĉe la enirejo.



ISTVÁN ERTL PRELEGIS EN NIA SIDEJO

Kiel ni anoncis pasintnumere, la 7an de oktobro en nia sidejo prelegis la konata verkisto kaj aktivulo István Ertl (hungardevena, loĝanta en Luksemburgio). Li prezentis sian lastan verkon, ĵus aperintan en la literatura revuo “Beletra Almanako”, kun titolo: «Vi(d)vokroniko, aŭ: Dek ok monatoj», pri sia sperto post la forpaso de lia edzino, Fabienne. Temis pri tre kortuŝa prelego, kiu tuŝis aferojn ne ĝenerale konsideratajn malferme en la publika sfero.



La partopreno estis sufiĉe alta, pleniĝis la salono de nia sidejo, kun homoj kiuj atente aŭskultis kaj ankaŭ komentis en posta kolokvo.

István partoprenis ankaŭ en la unuasabata renkontiĝo, kiun ĉeestis aliaj samideanoj venintaj el aliaj lokoj ekster Madrido, interalie Hungario, Portugalio, Egipto kaj aliaj.

KUNVOKOJ POR NOVEMBRO

La venonta unuasabata kunveno okazos en novembro ne la unuan sabaton, sed la duan, la 9an de novembro, por eviti la koincidon kun la ponto de la festo de la mortintoj. Ĝi denove estos kunvokita por la 6a vespere, en la kafejo de la kulturcentro MEDIALAB-Prado (strato Alameda, 15, proksime al CaixaForum).

Krome, la lundon 18an de novembro ni reprenos la kutimon de la lundaj beletraj tagoj. Ĉeestantoj kune legos pecon de teatro. Venu kaj kunlaboru.



SUKCESO DE LA NOVA KURSO DE ESPERANTO EN LA SIDEJO

Kiel ni anoncis en pasinta numero, la 12an de oktobro komenciĝis denove elementa kurso de Esperanto, gvidata de Pedro Hernández en la sidejo de Madruda Esperanto-Liceo. La reago estis tre kontentiga, kaj aliĝis al ĝi dek unu novaj lernantoj.

Memoru ke la 8an de novembro finiĝos la periodo por enskribiĝi en la kurso de la Centro por Instruado de Lingvoj (CUID) de la Universitato UNED, oficiale je nivelo A2. Vi povas konsulti ĉiujn detalojn en la retejo <https://www.cuid.uned.es/>. Hispana Esperanto-Federacio anoncis la kunvokon de stipendioj por junuloj (malpli ol 30-jaraj), kiu ricevos la duonon de la kosto de la kurso; interesatoj kontaktu la Federacion per la adreso: kurso@esperanto.es.

ATENTU LA FINON DE NOVEMBRO

Atentu, kaze ke la venonta Nia Voĉo aperu tute akurate en la ŝanĝo de la monato: ĝuste la lastan tagon de novembro finiĝos la unua aliĝperiodo por la 79-a Hispana Kongreso de Esperanto en Comillas (30a de aprilo ĝis 4a de majo 2020). Profitu do pli malaltan kotizon, kaj aliĝu antaŭ tiu dato. La aliĝilo troviĝas en <http://www.esperanto.es/kantea/eo/aliĝilo/>. Vidu pliajn detalojn en la adreso <http://www.esperanto.es/kongreso>.

KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30, kiel tradicie. La unuasabata renkontiĝo okazos la 9an de novembro, je la 6a horo, en Medialab-Prado.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrive/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

madrid@esperanto.es



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com